

REZIGNU

Esperantigo : Rovere Emanuele

muziko : De Curtis Ernesto / teksto : De Curtis Giambattista

Viaj kisoj min fajrigas, dezir' mia frenezigas
kaj mi scias, ke vi same sentas fajron en la kor'.
Donu, amatino kara, amon vian, ne estu avara !
Nun kuŝiĝu en brakoj miaj, sub la lunbrila kares'.
Steloj mil, al posteuloj, rakontados la fabelon
pri ĉi-amo, poreterne : vi kaj mi, feliĉa par'.
Do, bonvolu vi rezigni reziston vian al mi.
Por ĉiam estu mia, por ĉiam, por ĉiam !